*francilia esperanto-federacio*

# jarraporto 2003–2004

**1. Evoluo de la membraro kaj varbagado**

Ĉar ĉiuj franciliaj membroj [de UFE, ndlr] aŭtomate anas ĉe la Francilia Federacio, nia membraro sekvas tiun de UFE.

Krom unuopaj iniciatoj (ekz. kunveno en L'Haÿ-les-Roses fine de Oktobro), ni ne vere agadis al ekstero por diskonigi Esperanton.

Tamen la partopreno de la Federacio en la dungo de junulo far JEFO ebligos antaŭenigi delonge pridiskutitajn projektojn : pliaj deĵorhoroj por la akceptado en la sidejo, starigo de studcentro per la kelaj libroj kun UFE...

**2. Kursoj kaj ekzamenoj**

Ni plu organizas ĉiusemajnajn kursojn laŭ tri gradoj en la UFE-sidejo ; tamen pro miskompreno inter la skipo en la Homara Festo de La Courneuve kaj ni, la ĉijara lernantaro estas iom elreviĝa, malgraŭ Michèle Abada-Simon certigas tri kursojn lunde, krom tiuj de sia asocio en Asnières kaj tiuj por la libertempa universitato en Évry.

En Junio 2004 la ekzamenoj havis neatenditan sukceson : la multnombra lernantaro (ĉefe unuagrada) kaj la rapida organizado de « blankaj ekzamenoj » multe helpis por tio.

**3. Interna vivo de la Federacio kaj de la grupoj**

*(kunvenoj, kongresoj, renkontiĝoj kun aliaj grupoj kaj samideanoj, individuaj aŭ kolektivaj partoprenoj en Esperantaj manifestacioj naciaj kaj internaciaj)*

Pro manko de responsulo bonvola, la merkreda babilrondo ne plu okazas. Pro sinsekvaj fiaskoj en reklamado, Axel decidis rezigni pri ĝi.

Komitatano Madeleine Crépatte kreis asocion por arigi la Esperanto-ŝatantojn en Seine-et-Marne.

Nia Marta Ĝenerala Asembleo havis pli grandan voĉdonantaron ol kutime.

**4. Alekstera vivo de la Federacio**

*(rilatoj kun neesperantistoj, partopreno en forumoj kaj manifestacioj, prelegvojaĝoj)*

Krom unuopaj iniciatoj (ekz. kunveno en L'Haÿ-les-Roses fine de Oktobro), ni ne vere agadis al ekstero por pliigi la membraron.

Ni akceptis Flavion Rebelo, kiu turneis en Eŭropo por prezenti la projekton de interreta televido ITV, en la UFE-sidejo en Februaro 2004.

**5. Rilatoj kun UFE**

*(naciskalaj agadoj proponitaj de UFE, speciala agado okaze de la eŭropaj balotoj, efikeco de la departementaj komisiitoj)*

Pliaj rilatoj (bonaj) teksiĝas inter la UFE- kaj la Federacia Estraroj, ĉefe kadre de la projekto de studcentro kaj de la dungo de junulo.

Ĉefe komitatanoj de la Federacio anstataŭas la antaŭajn deĵorantojn Luiza kaj Materne : Jean-Louis Poullet okupiĝas pri la UFE-libroservo, Jean Lazert pri la aliĝoj per nova datenbazo, ktp.

**6. Estontecaj projektoj 2004**

Starigi studcentron kunlabore kun la kultura sekcio de UFE. Organizi « blankajn ekzamenojn » por apogi la Juniajn ekzamenojn en 2005. Pliefikigi la procezojn en la mastrumado de la sidejo.

*Raportis : Jean Lazert*